

# *Lingvo* *Internacia*



*Duonmonata gazeto*

*por*

## *Esperanto*

*eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato*

~~~~~  
*XI-a Jaro*  
~~~~~

PARIS V°

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, Rue Lacépède, 33

## ONI ABONAS L. I. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Espero*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29 **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono 5 frankoj, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono 7,50 fr.


Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la Kongreso: 60 centimoj.

**Pago por anoncoj:** 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» presliteroj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %.

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por  $\frac{3}{4}$  de ilia valoro.

---

DOKTORO SIFFRE  I. (Direktoro de l'Ecole pratique d'Odontologie), 97, Boulevard St. Michel, Paris, deziras korespondadi esperante kun nefrancaj dentkuracistoj pri malsanoj de dentoj kaj kuraciloj.

---

S-ro LOUIS PÉRIARD, Auxerre (Yonne) Francujo, deziras korespondi kun geesperantistoj, precipe fremdaj, per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj.

---

G. SUNDBERG, Bankoficisto, Jönköping, (Svedujo), deziras reprezenti respektindan firmon eksterlandan por vendo de ĝiaj produktaĵoj en lia lando.

## FLUGINTAJ REVOJ

Muzikverko, — duono soprano aŭ baritono, de PAUL WACHS. Teksto en Esperanto de A. GRABOWSKI.

Prezo 2 fr. — Ricevebla ĉe la

## Preso Esperantista Societo

33, rue Lacépède, — PARIS.

# Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

1 aŭgusto 1906

<b>Marcel Finot.</b> — Deveno kaj Evolucio de Universo. . . .	425
<b>Émile Gautier.</b> — Nu! Jen estas hundo! (trad. D <sup>ro</sup> VAL- LIENNE). . . . .	431
<b>N. V. Gogol.</b> — La Ukrajna nokto (trad. K. BOGUŝEVIĈ). . .	435
<b>Aleksandro Semenov.</b> — La estonta soldato (trad. B. KOTZIN)	436
Miksaĵoj : Progresanta civilizacio. — La ruĝa Morto. — Direktebla aerostato antaŭ 50 jaroj. — Nuntempa Sapiro.	440
<b>A. de Musset.</b> — Malĝojo (versaĵo trad. de D <sup>ro</sup> M. SEYNAEVE)	442
<b>Paul Champion.</b> — Interkultura kalendaro (aŭgusto). . . .	443

*Tra la mondo Esperantista :*

<b>Leo Belmont.</b> — Kelkaj pensetoj pri « eg » kaj « et ». . . .	447
Diversaĵoj : Mona demando. — Tutmonda labora Societo. — Rezultato de l'konkurso por aĵoj de l'Kongreso. — Laste aperintaj verkoj	453

**Nia aldono literatura** (paĝoj 225-240) : **La lasta Abenceraĝo**,  
de CHATEAUBRIAND (Trad. R. DESHAYS), *daŭrigo*.

## Deveno kaj Evolucio de Universo

El ĉiuj enigmoj de Universo, la plej granda, la plej malfacile solvebla, tiu kiu konsistas el la plej multaj problemoj, estas tiu de Komenco kaj vastigo de Universo, ordinare nomita Problemo de Kreo. La solvon de tiu malfacila enigmo multe pri laboris nia XIX<sup>a</sup> centjaro, kaj eĉ ĝi povis ĝin eksolvi. Almenaŭ ni vidas ke la diversaj demandoj rilataj al la kreo estas absolute kunligitaj, faras solan kaj plenan problemon universan kaj la solvo de tiu mira problemo estas donita de sola vorto : *evolucio*.

La gravaj demandoj pri kreo de homo, de bestoj kaj kreskaĵoj, tiu de tero kaj suno, k. t. p. estas nur partoj de tiu universa demando : kiel tuta Universo aperis? ĉu ĝi estis kreita

de supernaturaj procedoj, aŭ ĉu per naturaj procedoj ĝi kreiĝis! Kiaj estas la kaŭzoj kaj la procedoj de tiu evolucio?

## I

La unua scienculo kiu provis klarigi simple la konstitucion kaj la devenon meĥanikan de ĉiu kosma sistemo, laŭ principoj de NEWTON, tio estas laŭ fizikaj kaj matematikaj teorioj, estas KANT, en unu el siaj unuaj verkoj: *Historio natura generala kaj teorio de la ĉielo* (1755). Malfeliĉe tiu grandega kaj kuraĝa verko estis dum 90 jaroj preskaŭ nekonata, kaj nur en 1845, A. DE HUMBOLDT priparolis pri ĝi en unua volumo de sia *Cosmos*. Intertempe, fama franca matematikisto LAPLACE estis eltrovinta teoriojn similajn je tiuj de KANT, kaj ilin klariginta, laŭ matematika maniero, en sia *Klarigo pri la monda sistemo* (1796). La principoj de Kosmogonio de KANT kaj LAPLACE devenas de klarigo meĥanika de la movo de planedoj kaj de hipotezo kiu el tio rezultas, ke ĉiuj mondoj elvenas el nebulaĵoj kiuj estis kondensitaj.

Tiu teorio estas multe ŝanĝita kaj plenigita de tiu tempo, sed ĝi estas ankoraŭ nune neŝancebla. Kaj oni plenigis ĝin dum tiuj ĉi lastaj jaroj, aldonante ke tiu vastigo ne nur unu fojon okazis, sed ankoraŭ periode okazas kaj okazos. Dum, en iaj partoj de senlima spaco, turniĝantaj nebulaĵoj naskigas novajn mondojn kaj evolucias, kontraŭe en aliaj partoj, malvarmigintaj kaj mortintaj mondoj frapantaj unu la alian, dissemadigas polvere kaj denove iĝas malhelaj nebulaĵoj.

Preskaŭ ĉiuj malnovaj kaj modernaj kosmogonioj, kaj ankaŭ tiuj de KANT kaj de LAPLACE, certigis ke mondo estas havinta *komencon*. Do, laŭ tre famaj « hipotezo de nebulaĵoj », grandega nebulaĵo, konsistanta el materio treege maldensa kaj maldika estus kreita « en la Komenco », kaj poste de longe (senfine longe) movo de turniĝado estus komencinta en tiu nebulaĵo. Kiam la unua komenco de tiu movo estas akceptita, oni povas el tio konkludi kaj klarigi la formadon de mondoj kaj de planedaj sistemoj, laŭ la meĥanikaj principoj.

Jen estas la klarigo, kiun skribas LAPLACE en sia *Klarigo pri monda sistemo* :

« HERSHEL, observadinta nebulaĵojn per siaj fortikaj teleskopoj, studis la progresojn de ilia kondensiĝo, ne nur en unu

(ĉar tiuj progresoj estas videblaj nur post centjaroj) sed en ĉiuj, kiel oni studas en grandega arbaro la kreskadon de arboj sur diversaj arboj, el kiuj ĝi konsistas. Li observadis unue la nebulan mason dissemitan en kelkaj regionoj de ĉielo. En kelkaj el tiuj amasoj li vidis tiun materion densigitan ĉirkaŭ unu aŭ multaj kernoj malmulte helaj. En aliaj nebulaĵoj, tiu kerno disiĝas per densigo, el tio rezultas multaj nebulaĵoj, konsistantaj el helaj kernoj najbaraj, kies ĉiu estas ĉirkaŭita de atmosfero; fine post pli granda densigo, tiuj nebulaĵoj estas aliformigitaj en steloj ».

Laŭ tiu hipotezo, nebulaĵo estas unue varmega, ĝiaj eroj sin reciproke altiras, kaj ĝi turnadas tre malrapide ĉirkaŭ centra akso: do ĝi havas preskan sferan formon. Tiu figuro, la pondo de la akso, kaj la rapideco de la turnado estus senfine neŝanĝeblaj, se nenia nova kaŭzo okazus: tio estas la pli malpli rapida malvarmigado de la ekstera supraĵo. El tio rezultas malrapida kaj kreskanta malgrandiĝo de la nebulaĵo, kies la eroj alproksimiĝas la centron. Tiam, laŭ meĥanikaj leĝoj, la rapideco de turniĝado kreskas, kaj ankaŭ platiĝo de la nebulaĵo.

Sed malvarmigiĝante, nebulaĵo forlasis intersekve zonojn de vaporoj, en ebena de sia ekvatoro tio estas fundamenta punkto de la teorio de LAPLACE. Tiuj zonoj turnadas unuforme ĉirkaŭ la centra akso, per rapideco de nebulaĵo, en la momento kiam la zono estis disigita el la cetero de la maso. En ĉiu el tiuj zonoj, formiĝis koncentrigpunktoj, kiuj naskiĝis flankan kofpon, planedon. Oni tiel klarigas, kiel la planedoj moviĝas en sama direkto, preskaŭ sur sama ebena. Sendube la turnado devus esti ronda, sed tiuj faktoj ne okazis tiel regule kaj simetrie, kiel ni supozis.

Se ia zono ne povas kondensiĝi tute, aŭ se la kondenspunktoj estas tre multaj, oni havos ringon da korperoj; ekzemple, la ringo de malgrandegaj planetoj teleskopaj inter Marso kaj Jupitero.

Laplace montris plue ke la kondensado de nebulaĵo, kaŭzis turnadmovon de planedoj en sama direkto, kiel tiu de la nebulaĵo, kaj ĉirkaŭ akso paralela kun la unua. Tiel oni klarigos la rimarkindajn specialaĵojn de movo de la planedoj.

Nune ni prenu planedon tiel formitan; ĝi ne estos ankoraŭ malfluida, sed flanka nebulaĵo, unue vasta, kaj ĉi kiu iĝas planedo nur post longa tempo post novaj intersekvaj kondensa-

ĉiam plena je substanco. Tempo estas senfina, ĝi havas nek komencon nek finon, ĝi estas eterneco.

II. La substanco estas ĉiel kaj ĉiam movanta kaj ŝanĝanta neinterrompe; neniam regis absoluta ripozo; sed samtempe la senlima kvanto de materio estas tiel neŝanĝebla kiel tiu de energio eterne ŝanĝanta.

III. La eterna movado de la substanco tra spaco estas rondo, eterna, kun fazoj de evolucio perioda. Tiu evolucio devenas de kreskanta densigo de materio, kaj formado de sen-nombraj malgrandaj devigcentroj, kies kaŭzoj estas la originalaj internaj ecoj de substanco: sento kaj forto. Dum, en ia parto de Universo, malgrandaj korpoj naskiĝas kaj kreskos, en alia loko kaj samtempe oni vidas kontraŭan evoluĉion, detruon de korpoj ĉielaj per interbato. La sumoj grandegaj de varmo produktaaj, en tiu meĥanika laboro, per bato de korpoj turniĝantaj, estas aliformigitaj en novaj fortoj kiuj produktas la movon de kosmaj polvoj naskiĝintaj, kaj ankaŭ la novan formadon de turniĝantaj specoj la eterna ludo denove rekomencas senfine. Nia Tero, naskigita, de kelkaj milionmilionoj jaroj, de parto de Suna sistemo, iom post iom malvarmiĝos, kaj, post novaj milionmilionoj jaroj, ĉar ĝia orbito pli kaj pli mallarĝiĝos, estos altirita de Suno kaj sur ĝin falos, ĝis kiam Suno trairanta la spacon renkontos alian stelon, kaj per ilia interbato naskigos novan sunan sistemon...

Kaj nia Tero estas do nur polvo de Suno, simila je aliaj sennombraj milionoj da polvoj kiuj trairas tra senlima spaco. Nia homa Estaĵo malhumila kiu kredas sin imagon de Dio ne estas pli granda, en tuta Universo, ol formiko aŭ mikroskopa bacilo. Ni homoj estas ankoraŭ nur stadioj de evolucio de eterna substanco, simplaj formoj de materia energio, kies ni komprenas la nenion kiam ni estas antaŭ la senlima spaco kaj eterna tempo.

Marcel FINOT.

## Nu! jen estas hundo!

---

Oni rakontis al mi ke, por kutimigi siajn lernantojn al la esprimo de iliaj korsentoj, laŭ la noto ĝusta kaj la stilo kunrilatanta, iaj profesoroj de deklamarto ilin ekzercis tiamaniere: ili elparoligis de ili laŭ la tuta gamo de diversaj nuancoj de miro, ĝojo, teruro, kolero, bedaŭro, malespero, k. t. p. tiun tute sensignan frazeton:

— Nu! jen estas hundo!

Oni certigas ke ĝi estas bonega gimnastiko; kaj mi tre facile tion kredas. Ja, kiam oni scias anonci, laŭ la maniero konvena, per la tono kaj la gesto kunrilatantaj kun la cirkonstancoj, fakton tiel senvaloran kiel la ekvidon de servbesto pasanta, kredeble oni troviĝas armita por perfekte deklami en kiuj ajn momento aŭ loko:

— Mi adoras vin.

— Perfidulo, vi ekmortos!

Se la majstroj en la belelparoladarto elektis tiun iom malspritan formulon anstataŭ ian ajn alian, tio kredeble devenas de tio: la *ideo pri la hundo* ŝajnis al ili konjekteble la plej simpla, indiferenta, komuna afero, bezonante neniun imagpenadon, unuvorte io tiel preciza, tiel definitiva, tiel limigita, tiel konita, ke estis ebla neniun flankan komprenaĵon, neniun aliformiganta eraro.

Ja ĉiu tre bone scias kian aĵon estas hundo. Ĉiu scias aŭ prefere *kredas scii*. Mi eĉ volus klarigi, — ĉar iafaje iom da filozofio ne malutilas — ke kontraŭe nenio estas pli malsimpla, pli malklara, pli malpreciza, pli movema, pli diversa ol la *ideo pri la hundo*.

Sendube mia hundo, (se mi havus hundon), ekzistus same kiel ekzistas la via, sinjorino. Azor, Diane, Zouzou, Sultan, Toby ekzistas: ili estas estaĵoj realaj kaj konkretaj; ili donas pulojn antaŭ kiam ili inokulos la rabion aŭ la tuberklozon; ili lekas aŭ mordas laŭ sia temperamento; fine ili estas fotografeblaj. Sed la *hundeco*, la eco de hundo, la hundo *in abstracto*, tio ne ekzistas, tio estas nur spiritvido komparebla al linio, triangulo, cerklo. *Ne ekzistas hundeco*.

Mi rapide aldonas, por ne tro timigi miajn legantojn, ke

tiu paradokso ne estas tute mia. Mi ĝin prunteprenis, por apogi mian tezon, de unu el plej kuriozaj sprituloj de la nuna generacio, de S<sup>o</sup> Profesoro Frederic Houssay, kiu sub tiu titolo : *De l'abstraction dans les Sciences naturelles* (Pri la abstrakto en Naturaj Sciencoj), traktis tiun temon antaŭ nelonge en Sorbono, okaze de sia unua leciono. (V. *Revue des idées*, 15 decembro 1905).

La pruvo kuŝas en tiu fakto : mi povas certigi, kaj pri tio mi timas nenian kontraŭatakon, ke la plej sciencplena, la plej bone informita el la zoologiistoj neniam povos liveri pri la hundeco difinon, kiu alfarigōs facile, akurate kaj precize al bestoj tiel diversigantaj inter ili kiel la terfosisthundo (*terrier*), la danhundo, la malalthundo (*basset*), la slughio, la buldogo, la ungeghavhundo (*griffon*), la novterhundo, aŭ la paltkovrita leporhundeto.

Ne min kontraŭparolu, dirante ke ĉiuj tiuj rasoj, ĉiuj tiuj diversaĵoj, prezentas almenaŭ kelkajn komunajn karakterojn, kies apudmeto liverus ion similan al la hundoriginalo, kaj ke la ekzempleroj nun vivantaj estas nur devenaĵoj, alproksimaĵoj pli malpli similaj, aŭ prefere malbonaliformaĵoj, portretaĵoj de tiu hundoriginalo. Mi respondas al vi : tiu hundo-modelo ekzistas nenie, krom en nia imago, en kiu ĝi kuŝas sur la sama breto kiel la drakoj, la sirenoj, la likornoj, kaj la aliaj apokalipsaj monstroj. Ĝi ne havas objektan realecon ; — escepte se oni pretendas ke ĝi similiĝas kun la paŝtisthundo, kaj ke tiu raso estas konsiderinda kiel la radikraso de kiu estus elirintaj per filigo ĉu rajta ĉu malrajta ĉiuj aliaj hundaj specoj.

Tia respondo, kiu ŝajnas klarigi la demandon, reale klarigas nenion, pro tiu simpla motivo ke la paŝtisthundo malpli ankoraŭ diferencas el aliaj bestaj specoj, kiel la lupo, la vulpo aŭ la ŝakalo, ol la aliaj hundoj diferencas inter si kaj el tiu hundo paŝtista.

Ĉu do oni devas serĉi en la nova grupiĝo, kiun faras la hundoj, la lupoj, la vulpoj, la ŝakaloj kaj la aliaj hundformaj bestoj (*canidés*) novan prototipon komunan, ĉu imagan, ĉu realan? Estu. Sed oni malantaŭeniras por pli bone antaŭensalti ĉar la sama malfacileco reaperas pri la prototipo elektota per tia maniero, pretekstante ke oni difinas la hundecōn, oni alvenus de proksimo al proksimo ĝis la konsidero de la tuta bestaro kaj eĉ de la tuta estaĵaro ; ĉar la malsuperaj bestoj



kuniĝas kun la kreskaĵoj, kaj formas kun ili senintermankan sistemon.

Sed ni lasu tiujn trospritaĵojn, kaj konsideru hundon ian, ekzemple ĉi tiun, kiu en tiu momento pasas sur la strato; ni prenu tiun hundon, kaj ne serĉante dekkvar horojn kiam sonoras la dekdua, ni konsideru ĝin kun la spiritstato al ni kutima, kiam ni rigardas hundon.

Tiu hundo estus nek en tiu nek en alia loko, ĝi nenion reprezentus, se ĝi ne manĝus, ne trinkus, ne spirus, se ĝi ne estus provizita je sufiĉa kvanto da pano, da supo, da pastaĵo, da viando, da akvo, da oksigeno, k. t. p.

Sed la viando estas karno de aliaj bestoj; la pano, la supo, la pastaĵo estas la tero-kulturigita, la homa industrio, la kreskaĵo kiu malrapide prilaboras siajn rezervaĵojn en la grajno per la mistera influo de vegetaĵaj energioj, kun la kunlaborado de l'suno: la akvo, la oksigeno estas la atmosfera rondirado, estas la tuta naturo, kiu ekmontriĝas aganta kaj kies sendiskuteble la humilega hundo estas nur nedisigebla parteto.

Alitermine hundo plene kaj senpaŭze rilatas kun la universala medio, kun la senfina Kosmo. Antaŭ la okuloj de l' filozofoj ĝi ne apartiĝas el tiu Kosmo; kaj oni ne povas serioze pensi al hundo kaj samtempe ne elvoki tuje la tutan materion kaj la tutan forton, unuvorte la tutan aĵaron kaj la tutan ecaron.

« Supozu, diras S<sup>ro</sup> Frederic Houssay, ke dum tre bela vetero, vi metas sur la dorson de la besto kauĉukan mantelon. Post kelka horoj, la interno de tiu envolvaĵo estas plena je disfluanta akvo: elirinte el la hundo, en ĝi densiĝas vaporo, kiu sen tiu nepenetrebla barilo estus senpaŭze disvastiĝinta eksteren. Sen ĝi, ĉu ekzistas momento en kiu vi estus vidinta tiun vaporon elirintan el la hundo kaj fariĝintan atmosfera? Ne evidente ĉar tio estas neebla.

Do hundo montriĝas kiel senfina kaj senlima besto. Cetere nin informas pri tio niaj sentoj. Kiam ni eniras en ĉambron, en kiu troviĝas kundo, ni ne bezonas ĝin vidi por diri « Tie flariĝas hundo ». Efektive sennombra kvanto da molekuloj ellasiĝas de la besto plenigas la atmosferon: la hundo okupas la tutan ĉambron. »

Oni ne povas diri en kiu parto de la spaco hundo komencas kaj finas.

Pri la tempo, sama estas la afero: ĉar neniam hundo restas simila al si mem dum du diversaj momentoj.

Ĝi ne havas formecon sed multegon da sinsekvaj formoj, kiuj estas tiom da pasantaj ŝajnoj laŭ la epoko en kiu oni ĝin konsideras. Ekzistas eĉ iaj inter tiuj ŝajnoj kiuj, ekzemple dum la enutera vivo, neniel montras hundan figuron; ĉar la hunda embrio, kiu unue estis ovo, t. c. amorfa gelatena buleto kun malpreciza kerno, similas sinsekve fiŝon, birdon, ian ajn aĵon, escepte hundon.

« Do, la hundo ne estas reĝa objekto. Ĝi estas punkto, loko, en kiu sinsekve evolucias unu post la alia sennombra kvanto da ĉiuspecaj fenomenoj, kiuj lasas kiel postsignon de sia rapidpasinta ekzisto etan demeton da ia materio laŭ ia formo; al tiu restaĵo da tre longa serio da fariĝoj ni donas la nomon hundo.

Se ni konsideras unuflanke hundon kaj aliflanke la kvanton da nutraĵoj, kiujn ĝi englutis dum sia tuta vivado, ni klare vidas ke la nuna besto estas malgranda ereto, se oni ĝin komparas kun la grandega amaso, kiu tamen partoprenis ĝian historion; kaj se, ĝin rigardante, ni kun ĝi komparus la kvanton da akvo kaj da gaso, kiujn ĝi ensorbis, ni eĉ vidus ke ne troviĝas komuna mezuro por taksii la sensignitecon de la hundo rilate kun ĉio kio okazis ».

Kaj ĉar laŭ tiu vidpunkto la homo loĝas sur la sama linio kiel la hundo, tio tre bone montras kiel mallarĝa, malgraŭ nia malhumileco, estas la spaco okupita de ni en la mondo (vidita je *Sirius*, estus dirinta Renan), kaj kiel estas senutile, — mi ne diras: malsprite, — nin ĉagreni pro tiom da negravaĵoj, kiuj havas neniun gravecon, krom tiu al ili donita de ni.

Eĉ tie troviĝas la tuta moraleco de tiu disertacio. kiun iuj — ili akceptu miajn senkulpigaĵojn: unu fojo ne estas kutime — eble opiniis neĝustatempa, pedanta, seka kaj eĉ iom teda.

Nenio estas mem; ĉio devenas, ĉio miksiĝas, ĉio daŭriĝas, ĉio estas en ĉio.

EMILE GAUTIER.

Tradukis D<sup>ro</sup> Vallienne.

## La Ukrajna nokto

---

Ĉu vi konas la Ukrajnan nokton ? Ho, vi ne konas la Ukrajnan nokton ! Rigardu ĝin : de l'ĉiela mezo rigardas luno ; la neĉirkaŭrigardebla ĉielarkaĵo disvastiĝis, disetendiĝis ankoraŭ pli ne ĉirkaŭrigardeble ; brulas kaj spiras ĝi. La tuta tero estas en arĝenta lumo ; kaj mirinda aero, malvarmete sufoka, plena da dorloto, movigas oceanon da bonodoroj. Diinda nokto ! Ĉarma nokto ! Senmove, inspire staras arbaroj, plenaj je mallumo, kaj ĵetas grandegan ombron. Kvieta kaj trankvilaj estas tiuj ĉi starlaĝetoj ; la malvarmo kaj mallumo de iliaj akvoj malafable estas enŝlosita en la malnete verdaj muroj de ĝardenoj. La virgaj densaĵoj de frangolarboj kaj merizuroj timeme estas etendintaj siajn radikojn en la glacian malvarmon kaj iafoje paroletas per la folioj, kvazaŭ kolerante kaj indignante, kiam la bela nokta vento, alŝteliginte momente, kisas ilin. La tuta pejzaĝo dormas. Kaj supre ĉio spiras ; ĉio estas mirinda, ĉio solena. Kaj en l'animo neĉirkaŭpreneble kaj mirinde, jaroj da arĝentaj fantomoj gracie stariĝas en ĝia profundo. Diinda nokto ! Ĉarma nokto !

Subite ĉiu ekviviĝis : kaj la arbaroj, kaj la starlaĝetoj, kaj la stepoj. Ŝutiĝas la majesta tondrado de l'ukrajna najtingalo, kaj ŝajnas la luno ankaŭ plezure auskultadi ĝin meze de l'ĉielo ... Kvazaŭ ensorcita, dormetas sur altloko, vilaĝo. Ankoraŭ pli multe, ankoraŭ pli bele estas brilantaj sub la luno la amasoj de ĥatoj (1) ; ankoraŭ pli blindige eltranĉiĝas el la mallumo la malaltaj iliaj muroj. La kantoj eksilentis. Ĉio estas senbrua. Piaj homoj jam dormas. Tie, malofte, nur lumas mallarĝetaj fenestroj. Antaŭ la sojloj de iaj kelkaj malmultaj ĥatoj, malfruiĝinta familio faras sian maltruan vespermanĝadon.

N. V. GOGOL.

Tradukis K. Boguŝeviĉ.

---

(1) ĥato : domo malgrandrusa.

## LA ESTONTA SOLDATO

— Ho, Nikito, mia kara... vi foriras, kiam Dio revidigos nin?... — ploris la maljunulino, pakante en tolan sakon la malluksan havon de sia filo rekruto.

Larmoj riverse fluis sur ŝiaj maldikaj vangoj, tegitaj per pergamenta haŭto kun multaj sulkoj.

Nikito sidis silente, melankolie rigardante tra la fenestro.

Sur malgranda placeto, superŝutita per malvarmaj radioj de l'suno aŭtuna, ludis buboj de la vilaĝo. Ilia sonora rido sonis en la tuta vilaĝo, iliaj gajoplenaj ŝercoj resonis en la trankvila aero de l'klara tago. Ĉio, ĉio en la plej bagatelaj detaloj estis la sama kiel antaŭ 10-12 jaroj. Tie ĉi sur la sama kampeto tiam ludis Nikito kun siaj kolegoj; ĉio restis la sama... La samaj ulmoj maljunaj, ĉe kiuj la senindulga mano de l'aŭtuno demetis la festan vestaĵon; la samaj kliniĝantaj dometoj de vilaĝanoj kun malhelaj fenestretoj malgrandaj; la sama stango kun blanka tabulo surskribita per grandaj nigraj literoj *Vilaĝo Zapola, 12 « kortoj »*... Al la stango estis alligata la maljuna Antipo en tiu terura tago. De tiam pasis multe da tempo. La rapide fluanta vivo senhalte alportis novajn malfeliĉojn, novaj impresoj aperis en la kapo de Nikito... sed li ne forgesis la detalojn de *tiu* tago kaj ne forgesos, se li vivos ankoraŭ mil jarojn. La tuta pentraĵo kvazaŭ en panoramo rapide repasis en la memoro de Nikito.

Ĉio komenciĝis pro arbaro de l'bienhavanto, pro la arbaro, kiu estas videbla tie trans la rivero.

Mankis hejtaĵo kaj branĉaĵo, la dometoj ĉe la plimulto, kliniĝis kaj estis distalontaj... Tial la vilaĝanoj decidis utiligi la arbaron de l'bienhavanto. Sed ili ne liveris eĉ dekon da traboj, ĉar Zapola'n subite atakis bando da kozakoj, komandataj de senliphara oficiro. La vilaĝanoj estis alkurigitaj sur la placo, kie nun ludas la infanoj. Palaj, konfuzitaj, ili staris sen ĉapoj. La oficiro rajdis antaŭ ili.

— Ribeluloj! Mi ordonos, ke oni batu vin kiel furiozajn hundojn... Kiu estas la iniciatistoj? Kiu? eliru!... — kriis la oficiro aldonante al ĉiu vorto aron da malkonvenaj insultaĵoj.

La amaso silentis.

— Ĉu vi aŭdis, malnobluloj! Elirigu tien ĉi la iniciatistojn! Porkuloj!

— Ni ne havas iniciatistojn... ni ĉiuj estas iniciatistoj, — eksonis ies trankvila voĉo.

La oficiro paliĝis pro kolero.

— Kiu arogante kuraĝis diri tion? Kiu? Trovu tuje... — ordonis li al la kozakoj.

Post kelkaj sekundoj la kozakoj tenis en la manoj tute grizharan maljunulon.

— Ĉu vi diris pri iniciatistoj? Vi? Ne mensogu!

— Kial mensogi? Mi diris kaj diras: ni ne havas iniciatistojn, ni ĉiuj estas iniciatistoj, ĉar al ĉiuj mankas hejtaĵo kaj branĉaĵo, ĉar ĉies dometo falas...

— Fripono! Vi diskutas? Batu lin bone!

La kozakoj, kvazaŭ sovaĝaj bestoj sin ĵetis al la maljunulo kaj en la momento forŝiris la veston... En la aero ekfajfis skurĝo, aŭdiĝis bato sur ion molan... eksonis mallaŭta ĝemo mallonga...

La amaso ektremis kaj instinkte sin ĵetis for.

— Staru senmove! — ekkriis la oficiro. — Se iu sin movos, mi ordonos pafil!

La amaso rigidiĝis.

Kelkaj monatoj pasis de tiu tempo, sed Nikito ĝis nun klare vidas la blankan maldikan korpon de la maljunulo regule batatan per skurĝoj, kvazaŭ per draŝiloj, postsignantaj malhelajn striojn. Ialoke la haŭto krevis kaj el la vundoj, guto post guto, fluis malhela sango. La maljunulo stertore ĝemis.

— Dio mia, pardonu ilin... — aŭdiĝis lia kaduka voĉo, balbutanta pro doloro kaj turmento.

— Kanajlo! Nun li Dion ekmemoris... Rabonte li ne memoris... Batu do, batu... Ne ŝparu la skurĝojn... Ni aĉetos novajn.

La skurĝoj regule levigis, fajfis en la aero kaj falis sur la korpon. La ĝemoj ĉiam pli kaj pli mallaŭtiĝis, la korpo konvulsie tremis.

— Sufiĉe! Levu vin! — komandis la senliphara junulo, en kies manoj sin trovis la vivo kaj morto de grandaĝuloj.

La maljunulo kuŝis senmove.

— Levu lin kaj alligu al stango!

Post kelkaj minutoj la apenaŭ spiranta maljunulo estis alligita al stango.

La tuta korpo estis kovrita per nigraj makuloj kaj teruraj vundoj. La grizhara kapo senvive malleviĝis sur la bruston...

La amaso staris kvazaŭ malviva.

Io timinda neevitebla pendis en la aero. Estis senteble, ke tuj fariĝos io monstra, abomena... Kio? Neniu el la ĉeestintoj povis klare respondi tian demandon.

— La ĉanojn supren! — eksonis akra voĉo de l'oficiro...

— Celu!

Du dekoj da pafiloj estis direktataj kontraŭ unu duone viva homo...

— Pafu!... — Eksonis akra pafaro...

Ekaŭdiĝis ĝemoj.

Kio estis plue, — tion Nikito ne memoris, ne konsciis. Iu estis vergata, batata, estis aŭdata malkonvena insultado, plorado de infanoj kaj virinoj...

Nun, post longe, forironte militservi, Nikito image vidis la sovaĝajn vizaĝojn de l'kozakoj; en liaj oreloj sonis ĝemoj kaj pafoj... Li otte sonĝis, ke oni pafas ne kontraŭ la maljunulo sed kontraŭ li mem, la juna kaj fortoplena; li vekigis kun krio de teruro, malvarme ŝvitante.

De tiam lia mallaborema cerbo dormetinta 20 jarojn komencis senlacan laboradon. Li unuafoje komprenis kaj konsciis, ke en la lando krom ilia mondo vilaĝana ekzistas ia alia mondo malamika, englutonta ilin.

Kiu estas la kulpulo de ĉiuj tiuj kruelaĵoj kaj mokaĵoj; kies animon ŝarĝos la granda peko? demandis li sin mem kaj ne povis trovi respondon. Tiaj pensoj tute okupis lin kaj dolore turmentis; nenie, nenie li povis trovi pacon.

« Kiu?! demandadis li sin mem. — Ĉu la administranto, ĉu la poliestro, ĉu la oficiro ordoninta bati kaj pafi? Sed ili ja ankaŭ havas sian estraron. Kiu do? Ĉu la registaro? Aŭ la bienhavanto ne permesinta utiligi la arbaron?

Nun, forironte militservi, li denove resolvadis la problemon proponitan de la vivo mem, li denove ripetadis la centfoje pripensitan.

— Niĉjo, — interrompis lian senordan pripensadon la voĉo de la maljuna patrino, — iru, manĝu ion, jam estas tempo... Vi ja vidas, ke la patro enjungis la ĉevalon.

Nikito silente komencis manĝi.

Mia kara, mia karega; kiam Dio revidigos nin? ploris la patrino.

Nikito glutis larmojn kun la pecoj da nigra pano malmola. Li sentis, ke la larmoj kvazaŭ larĝa ondo rulas al la gorgo, ke post kelkaj minutoj li ekploros, ploregos kiel infano.

— Panjo, ne ploru... Estas sufiĉe malgaje kaj malĝoje.

En la dometon venis la patro.

— Nu, Nikito, — diris li. — La ĉevalo jam estas preta... Preparu vin... Ni preĝu Dion kaj veturu.

Nikito leviĝis de l'benketo, surmetis kitelon, sin zonis per rimeneto kaj stariĝis apud la patro antaŭ sanktfiguro.

Kun serioza tono solena la maljunulo komencis legadon de senfine longaj preĝoj, petante la ĉiopovan Dion, ke li benu la rekruton-filon kaj helpu koneste elporti ĉiujn malfacilaĵojn de la vivo soldata.

De tempo al tempo ili ambaŭ salutis ĝis la tero kaj faris larĝajn signojn de kruco.

Fininte la maljunulo diris per delikata voĉo karesa: — Nu, filo mia, petu nun benon ĉe la patrino... ŝi benu la filon.

La patrino prenis de l'muro malnovan sanktfiguron, kovritan de fumajo kaj proksimiĝis al Niĉjo.

— Benu vin Dio... Honeste servu por la caro, plenumu vian devon... Ĉefe do ne forgesu Dion, ne forgesu... kaj ne pafu kontraŭ viaj fratoj, ne pafu kontraŭ laboristoj kaj vilaĝanoj... Prefere la estraro punu vin... Ne peku... Se vi tamen pafos, tiam memoru: mi ne benas vin... Mi malbenos... La patro ankaŭ malbenos... Ĉu vi aŭdas... malbenos... Ĉu vi aŭdas... malbenos... Nu, kisu la sanktfiguron kaj ĵuru, ke vi ne pafos!...

ALEKSANDRO SEMENOV.

Trad. Boriso Kotzin.

---

## MIKSAĴOJ

**Progresanta civilizacio** plidelikatigas videble morojn de l'homaro. Nun oni jam sukcesis, uzi novan specon de l'duelo, en kiu eĉ malgraŭ mortiga eliro la interbatalo finiĝas nepre sensange. Tiam duelon, kiu estas salutota certe kiel progreso el vidopunkto de l'humaneco, franca gazeto priskribas sekvamaniere : « Redaktoro de romana gazeto ricevis iutage la sekvan skribaĵon : « Tial ke oni ne sendas siajn sekundantojn al fripono, kia vi estas, mi survangigas vin per tiu ĉi letero. Rigardu do vin vangofrapita de mi sur ambaŭ vangojn kaj danku Dion, ke mi ne punegis vin per mia bastono ». La ricevanto, tiel atakite, ekprenegis sian plumingon kaj respondis : « Nekomparebla batalisto! Mi plenumigas vian peton, dankante vin korege por la leteraj survangoj al mi transsenditaj anstataŭ realaj batoj. Tial ke vi survangigis min letere, mi nun paŝas letere ses kuglojn de revolvero en vian kranion, vin mortigante. Rigardu do vin kiel malviva, leginte lastan linion de ĉi tiu skribaĵo. Salutegante vian kadavron... ».

**La ruĝa morto.** — Multekolora, kiel la popola miksaĵo de rusa imperio, estas ankaŭ la kalejdoskopo de l'rusaj societoj religiaj. La sektaro, kiel en Rusujo tiel forte estas disvolvita verŝajne nur ankoraŭ en Ŭnuigitaj Ŝtatoj Amerikaj. En Polujo Mariavitoj plinombrigis la sektaron, en Petersburgo sekto de Joanitoj estas rilate al tio la plej nova; pri Skopcoj, Molokanoj, Duĥoboroj k. t. p. la tuta verkaro pri rusuja raportas. En la imperiego, en kiu petado de almozoj havas saman valoron, kian bonekonvena agado, la multenombraj pilgrimoj, se ili ne estas almozulaj monaĥoj, apartenas al unu aŭ al alia sekto. Nun oni aŭdas pri nova societo kredemula, kies agado meritas, esti konigata al pli granda publiko. En gubernioj Wjatko kaj Jekaterinenburgo ia sekto nomas sin « Krasnopoduŝniki » (la gefratoj kun la ruĝaj kusenoj). Malluma sekreto flugpendis super la timiga societo. Nun oni sukcesis, iomete ekrigardi en ritolibron eĉ de ĉi tiuj stranguloj. En fabrikejo Kasli'o de distrikto Jekaterinenburga ia laboristo malaperis, kiu apartenis al « Krasnopoduŝniki'j ». Esploroj havis rezultaton, ke nokte li estis dekondukita de aro da nekonatuloj el sia loĝejo, metita en veturilon kaj portita en templon ĉe la fabrikejo sidantan.



Trovinte la vojon, oni penetris en la templon; tie oni ekvidis malplenan senfenestran ĉambron tapetitan per ruĝa drapo. Nigra plafono malkovras duan eniron. Meze de la ĉambro du ruĝaj kusenoj kuŝas. En tiu ĉi ĉambro oni plenumigis la deziregon de la kredemaj anoj de l'sekto, ekkoni la pli bonan ejon transmondan, se ili meritis ĝin laŭ juĝo de l'kunsocietanoj. Oni kondukas la mortontulojn en la ĉambrojn, metas ilin je kapo sur unu el la kusenoj kaj poste soligas ilin. Post kelko da minutoj la nigra plafono antaŭ la dua pordo levigas kaj virgulino, vestita en ruĝa robo, enŝtelas sin en la ĉambron. Malrapide ŝi proksimiĝas al la surplanka kuŝanto. Ekfarinte diversajn ceremoniojn, ŝi prenas la duan kusenon kaj metas ĝin sur kapon de l'sektano. Poste ŝi sidiĝas sur la kusenon kaj sidadas sur ĝi tiel longe, ĝis la kredemulo, kies kapo kuŝas malsuper la kusenon, ne montras jam signon de vivo. Li eniris en la pli bonan ejon transmondan. La virino malaperis. La viroj, kiuj alportis sian kredulan kunsocietanon, reaperas kaj forportas la « ĝismortan siditulon », por enterigi lin en sekreta tombejo. Pluon la esplorantoj ne povis sciigi pri la sekto. Sed oni povas konkludi el iliaj multenombraj temploj, ke ĝi havas anaron tre grandan.

---

**Direktebla aerostato antaŭ 50 jaroj.** — En ia malnova folio flaviginta de gazeto el jaro 1857<sup>a</sup> ni trovis la sekvan noton rimarkindan : 15<sup>a</sup> de januaro estis la memorinda tago, je kiu la grava demando pri eblo, arbitre direkti aerostaton, ricevis prosperan decidon. En tiu ĉi tago grafo de Pleuvier, sinjoroj Gavarni, Mignon, Henry Page kaj angla aerostatisto Falkoner levigis en parko de la unue nomita sinjoro per aerostato por tiu ĉi nura celo konstruita kaj je la sekvanta mateno mallevigis antaŭ unu mejlo (angl.) kontraŭ Alĝerio; je la tuj sekvanta mateno ili relevigis kaj realvenis je tria kaj duona horo de l'sekvanta mateno en parko de grafo Pleuvier. La aparato, kostinte ne malpli ol tridek mil frankojn, konsistas el du sferformaj pilkegoj apude kunligitaj, sed la moviganta forto havas kaŭzon en ia ŝraŭbaĵo, kiu estas ligita kun la aerostata ŝipo kaj en fiŝostaja direktilo.

W. F.

---

## MALĜOJO

---

*El A. de Musset.*

Min lasis forteco kaj vivoradi',  
 For de mi amikoj kaj ĝoj rapidis,  
 Min lasis fiero de mia geni'  
 Al kiu mi iam konfidis.

Tuj kiam aperis la Vero al mi,  
 Ke vere ĝi estos amiko mi kredis,  
 Sed kiam la fundon mi konis de ĝi,  
 Jam mian animon ĝi tedis.

Ĝin tamen neniam haltigos templim'  
 Kaj kiuj rigardis ĝin kun malestim'  
 Senfrukte ja ili laboris.

Je l' Dia parolo eksonu respond' !  
 Nun restas ankoraŭ al mi en la mond'  
 Nur ke iafoje mi ploris !

Trad. D<sup>ro</sup> M. SEYNAEVE.

---

## NUNTEMPA SOPIRO

---

Staras sola boteleto da benzino  
 En la kestangulo ĉe la tajlorino ;  
 Volas dormi; nur forigi grasmakulojn,  
 Tio ne estas celo por spritvivuloj !

Ĝi dormas; ĝi revas pri aŭtomobilo  
 En fiero, ŝtalo, mirinda rebrilo,  
 Kiu, malbonodorante, trorapidas,  
 Kaj ĉiujn vojojn mortige malcertigas.

MIKSAJOJISTO.

# Terkultura Kalendaro

(daŭrigo)

## A Ŭ G U S T O

Tiun ĉi monaton oni nomis Aŭgusto pro la samnoma romana imperiestro. Kaj ĝi estas eble pli bone nomita ol oni ĝenerale pensas, ĉar ĝi ŝajnas esti vere la imperiestro de l'monatoj.

Imperiestro por multegaj homoj: por tiuj, kiuj trakuras la marbordojn, kovritajn per kvietiganta saŭmo; por tiuj, kiuj ĉiujare vizitadas la banlandojn, aŭ prefere la banurbojn, laŭditajn pro la kutima modo, en kiuj, se ili ne trovos tiun bonfarton, kiun ili kredas esti perdintaj, ili retrovos almenaŭ malnovajn geamikojn kun kiuj ili forgesos espereble tiajn ofte fantaziajn malsanojn; por tiuj, kiuj lacigitaj de l'urba bruado ŝercas « en monto », kiel kantis iu el niaj agrablaj poetoj (H. Sentis), ne nur freŝigan ripozon, sed ankaŭ murmuran muzikon de l'Alpa venteto tra la pinaj branĉetoj, aŭ pli supren irante sur la mutaj ŝtonegoj ekaŭdos vibrantan ĉielon; por tiuj, kiuj — inter timiano kaj roso — trairas niajn riĉegajn valojn kiujn lukse tapetas tiom da ĝojaj kaj diverskoloraj kreskaĵoj; por ĉiuj, kiuj forkurantaj la grandajn loĝejaĵojn, samtempe kiel iliajn polvo kaj enuoplenajn stratojn, deziras antaŭ ĉio vivigan puraeron, kaj precipe liberecon.

Libereco! kara, karega, sankta libereco! ĝin alportas al mi la dia Aŭgusto... kondiĉe tamen ke mi lasos hejme mian ĝardeniston, por anstataŭi min. Li faros tion tre vole.

Neniu estas sensenta pri viaj ĉarmoj, Aŭgusto benata; vin ĉiu laŭdegas kamparano, juĝisto, oficisto, liceano, profesoro, Esperantisto.

Pripensu do! Ĉiuj sportoj estas agemaj ankoraŭ; tie ĉi kaj tie bovoviraj kaj ĉevalaj kuradoj, kvankam ili jam estas de longe komencitaj; ĝimnastikaj, muzikaj aŭ pafadaj konkursoj; lokaj festoj agrabligataj per ĉiuspecaj ludoj; suprenrampadoj organizitaj al altaj montoj; promenadoj en barko sur riveretoj, aŭ en ŝipetoj sur maro laŭlonge de niaj bordoj; kunveno de sciencaj societoj, kiuj tre zorge ŝparis al vi plej malgrandan malkontentigon. Kion mi diros plie?

Kien ajn vi iros, tion vi certe trovos, kio pli taŭgas al via

deziro. Ĉu mi aldonos ke — se tamen nenio devigos vin iri tien ĉi pli vole ol tien — vi faros eble pli bone forkurante la tro ofte trakuritajn vojojn, sur kiuj moviĝas — kiel rapide, granda Dio! — tiom da veturiloj, aŭtomobiloj, bicikloj k. t. p., ekster la majestaj lokomotivoj ĉiam daŭrigantaj senlaca vojrado.

Mi kredas ja ke vi pliamos — kaj vi ĉiam kaj ĉie renkontos — misterajn pejzaĝojn, ombrajn arbaretojn, ĉarmoplenajn stepojn, poeziajn riveretojn, dolĉan kaj virgan solecon de l'via revita landanguleto!

Antaŭ longe malfermita estas fiŝkaptado; mi konas iujn (ili estas plej bonaj el ni), kiuj tuj iros fiŝkapti.

Atendante mi ordonas la jenon *al nia* ĝardenisto

En la *pejzaĝa ĝardeno* vi multe surverŝos dum tiu ĉi monato, ne kontentigante surverŝeti la teran supraĵon. Vi sufiĉege surverŝos, tiamaniere ke l'akvo malsupreniru ĝis la pinto de l'radikoj, kaj vi precipe atentos pri tio la kreskaĵojn, kulturitajn en potoj.

Ni konservos sub vitraĵo aŭ en varmejo la molajn kreskaĵojn, tranĉitajn kaj plantotajn en la venonta jaro: geraniumojn, heliotropojn, alternanterasojn, akirantojn, gnafaliumojn, ageratomojn, antemisojn, koleusojn, k. t. p. Vi rikoltos la semojn de la plej multaj kreskaĵoj.

Dujarajn kaj persistajn kreskaĵojn vi daŭrigos semi: Miozotojn, ankoliojn, lekantetojn, silenojn, kampanulojn, k. t. p., kaj vi repikos la kreskaĵojn semitajn en la antaŭa monato.

La blankaĵon kaj rustaĵon vi kontraŭbatalos per sulfuraĵoj, zorgante ne atendi ke la malbonaĵo okazu — pli bone estas antaŭzorgi ol resanigi,

De la deka de Aŭgusto, vi ekrezervos la kronajn butonojn sur la krisantemoj, forigante la burĝonojn ĉirkaŭe vastigantajn. Tion vi faros kiam la butonoj estos ankoraŭ tre malgrandaj, kaj prefere matene; vi konservos atente la ĉiam necesan apogon, kaj plenumos la malplenaĵon de l'poto per riĉa kunmetita grasigaĵo.

En la *legoma ĝardeno* vi semos laktukojn, bulbojn, brasikojn, kiuj, pasigontaj la vintron, nur estos konsumataj dum la sekvonta printempo. Vi semos spinacojn, napojn, leontodojn; vi tortiros el tero la bulbojn; vi ĉirkauos per teraĵo la celerion por ke ĝi blankiĝu; vi tranĉos artiŝokojn ne fruktodonantajn, kies okuletoj, tio estas naskigantaj artiĉokidoj, vi indulgos tamen, surverŝante kaj fosetante ilin ofte — vi metos idarejen la fragujajn forŝovaĵojn (les coulants de fraisiers).

En la *frukta-ĝardeno*, vi elapogos la fruktajn arbojn, kaj rompos la branĉetojn tro fortikajn por lormigi fruktodonantajn

butonojn; vi surverŝetos la persikujajn, deturnante la foliojn kiuj kovras la fruktojn; kelkajn foliojn vi povos eble forigi, sed vi ne elŝiros ilin, ilian voston nur tranĉante.

Vi kun plezuro rikoltos la frumaturajn fruktojn, sed vi tre atentos, precipe pri la persikoj, ne apogi la dikam fingron por certigi pri ilia matuneco, ĉar en molaĵo fariĝas nigra makulo, vi ĝin ekkaptos per plenmano, kaj turnigos malforte; matura persiko tuj disiĝas el arbo.

La somerajn pirojn vi kolektos almenaŭ kelkajn tagojn antaŭ ilia matureco, kaj enmetos en fruktejon; ili tiam fariĝos tre sukaj; ili male fariĝus tre pastaj, se ili maturiĝus sur arbo.

Vi ensakigos la ekmaturantajn vinberojn; vi metos laŭlonge de la spaliroj botelojn enhavantajn mielan akvon por ekkapti muŝojn, vespojn kaj aliajn insektojn.

Sed vi, malтелиĉa terkulturisto, vi ne tro ĝuos *en la kamparo* ĝeneralan aŭgustan libertempon.

La plenrikolto de grenoj ne estas ĉie plenumita, kaj vi de nun devas ja prepari la teraĵojn por la venonta jaro.

Vi devas veturigi sterkajojn, kalkon, kalkargilon; displugi, ensemi la senkovrigitajn rikoltojn (les récoltes dérobées), aĉeti grasigotan brutaron, fine zorgi pri la definitiva kolekto de ĉiuj rikoltoj.

Atentajn zorgojn postulas antaŭ ĉio viaj hejmaj bestoj, kiuj kredeble pro la troa varmo, kaj la troa lacigo, bezonas pli grandajn manĝporciojn. Vi donas do pli da aveno kaj pli da furaĝo al ĉevaloj. Oni apartigas el iliaj patrinoj la ĉevalidojn naskiĝintajn de februaro ĝis majo, kaj oni provizas ilin per 3 kilogramoj da seka furaĝo, 2 litroj da aveno, kaj 1 litro da fabettaruno kaj brano en kvin manĝadoj.

La ŝafbestoj sin paŝtas per grenaj pajloj; la kornbestoj vivas sur herbejoj.

Oni rikoltas mielon en abelejoj, kaj oni portas abeluojn apud la florajn kampojn.

La senkulturejojn kamparisto ĉiam lastafoje plugas, sed post bona herpado; li daŭrigas ankaŭ la duajn plugojn de la sarkitaj rikoltoj.

Oni semas en tiu jartempo: la kolzan brasikon, de 10 ĝis 12 litroj, jetfluge, sur senkulturejoj; la vintran napbrasikon, de 10 ĝis 12 kil. por hektaro, ankaŭ jetfluge; la unuflozan lenton, kaj alian lenton por verda aŭ seka furaĝo; la viandkoloran trifolion, de 18 ĝis 25 kilogr. por unu hektaro, kiun oni tre sukcese semas sur senkulturita grenaj pajloj.

Ĉu mi devas memori ke vi povos utile uzi la foliojn de multaj arboj por nutri brutaron? : ulmon, karpenon, salikojn, siliojn, k. t. p.; nature antaŭ ol ili flaviĝu!

Sed li flavigas, ho ve! sub la sunaj radioj, la ĉiam laboranta terkulturisto! Li estas tamen kontenta tial ke li ĝuas ja la enmetitajn rikoltojn, kaj la estontajn antaŭvidas.

Mi finis.

Sed, intertempe, dum mi zorgis tiel atente pri viaj ĝardenoj, multaj samideanoj alvenis al mi, demandante kien mi iros dum Augusto aŭ Septembro.

— Mi nescias ankoraŭ, respondis mi — Kaj vi?

— La unua diris: Mi vojaĝos tra Svisujo, — Mi, diris alia, ŝipveturados sur la Lemana lago.

Kaj iliaj: — Mi festenos en Vevey — Mi aĉetos poŝhorlegeton en Genevo. — Mi (tiu ĉi estas inĝeniero tre lerta), mi devas studi la aliformigojn de l'Rheinaj akvoj bluiĝantaj en Genevo. — Mi, diris mallaboremulo, fiŝkaptos en la rivero Arve. — Ni, aldonis aliaj ankoraŭ, ni kunvenos kun amikoj en Genevo.

Ili ĉiuj iros Genevon!

Mi pripensis ja ke, en Genevo estas bela botanika ĝardeno. — Mi tre deziras vidi ĝin, ĉar oni jesis al mi ke tie, de la 28<sup>a</sup> de Augusto ĝis la 6<sup>a</sup> de Septembro 1906, estos elmetata mirinda kreskaĵo, enradikiĝebla tre facile, kaj tre rapide multiĝanta.

Oni diris ankaŭ ke ĝi estas tre taŭga por ĉiuj homoj, sub ĉiuj klimatoj. Nenion plue mi scias, se ne la jenon: la elpensinta ĉefĝardenisto estas nomata Zamenhof, kaj la tiel utila kreskaĵo: Esperanto!

— Esperanto! ĝi estas ja la nomo kiun vi diris, ne vere?

— Jes!

— Ĉu ne estas dubeblua kreskaĵeto, kiel tiu ĉi? — kaj samtempe li montris al mi beletan sed ne fortan florfoliareton.

— Ne, tute ne! amiko! — Esperanto jam vidiĝas per multaj plenvivaj bukedoj, kun belegaj verdaj folioj, ĉirkaŭantaj tutĉielajn promesplenajn florojn.

— Kaj mi klarigis al li kio estas Esperanto...

Li ankaŭ iros Genevon, por provizi sin per la tiel bona semo.

Paul CHAMPION.

# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## Kelkaj Pensetoj Pri « eg » kaj « et »

Mirinda konstruo de nia lingvo artefarita malfermas novajn horizontojn al homoj pensemaj, amantaj la demandojn lingvistajn. Ne unufoje mi sonĝas, ke kun tempo aperos la speciala « filozofieto » de Lingvo « Esperanto », okupanta sin je klarigo de novaj penspuancoj, naskotaj logike el kunigoj neordinaraj de radikoj kaj sufiksoj. Kaj ebla estas, ke ĝi ne estas nur ludo teoria, ke ĝi estos... serioza filozofio, havonta signifon ankaŭ por praktika uzado de nia lingvo. Ĉar nur teorio povas instrui, kiu estas la rilato de pensoj niaj al vortoj artefaritaj, forte kunmetitaj, kiaj estas la havoj pensaj de sufiksóĵ, en kia grado la logika precizo de ideoj atingebla estas en nia lingvo.

Ĉar tia tempo ne estas proksima kaj alvokataj seriozaj filozofoj ankoraŭ preskaŭ ne aperis, mi kuraĝas de mia flanko meti ŝtonetojn al estonta konstruaĵo. Nur mi petas la legantojn, ke ili ne atendu de mi ion gravpezan, plenegan, larĝe laboritan. Se ne la fortoj, la tempo do senkondiĉe mankas al mi por profunda esplorado eĉ de tiu demando, kiun mi volas hodiaŭ ektuŝi; al mi, homo tre okupita, mankas la tempo por preciza klarigo de miaj pensoj en tiu ĉi malfacila laboro. Sed mi pensas, ke taŭgas ankaŭ starigo de demandoj, ke estas bone eĉ alvoki la estantajn fortojn al komuna klarigo de novaj demandoj sur fundamento Esperanta. Ni, esperantistoj, devas do komune pripensi, kune labori por la profundigo de spirito de nia lingvo!...

De tie mi volas hodiaŭ priparoli iom ajn pri la demando, kiun mi nomas : « *egeco kaj eteco* ... »

### I

Ĉian ideon, esprimitan per vorto radika, mi povas ŝanĝi en skalo je du direktoj.

Mi povas ĝin grandigi per « eg » aŭ malgrandigi per « et ». Jen estas demando : ĉu egigante aŭ etigante mi ricevos ĉiam nur tion saman en pli granda aŭ pli malgranda skalo, aŭ ĉu mi ricevos iafoje ankaŭ la novan ideon.

Pure logike radika vorto kun « eg » aŭ kun « et » devas esti ĉiam sama ideo, nur grandigita aŭ malgrandigita, aŭ, se iu volas tion alie esprimi : estos nova ideo nur en senco de grandigo aŭ malgrandigo de ideo antaŭe havita en radiko.

*Dometo* estas malgranda domo kaj *domego* = domo granda.

Sed prenu ni alian radikon, ekzemple « ŝtonon » : *ŝtoneto* estos malgranda ŝtono ; sed *stonego* (Rocher, Fels) ĉu ĝi ne estas laŭ senco nova ideo ? Ĝi do estas ŝtono nature metita inter montoj, ŝtono monta, stono ne nur iom grandigita sed havanta sufiĉe grandan skalon !

Verŝajne, oni povas diri, ke ankaŭ monto ŝtona estas nur tre granda ŝtono. Sed ĉu *la rilato spaca* inter domo kaj domego estas sama, kiel rilato inter ŝtono kaj ŝtonego ? Mi ne pensas...

Mi volas diri li ĵetis sur lin malgrandan ŝtonon. Mi povas diri : « ŝtoneton », anstataŭ « malgrandan ŝtonon ».

Sed se mi diros : « Li ĵetis sur lin ŝtonegon » ĉu tio ne estos sensenco ? Ĉu mi ne devas diri : « Li ĵetis sur lin grandan ŝtonon » ; kvankam mi povas diri tute bone : « mi vidis domegon », se mi parolas pri granda domo !

Simile, se mi prenas ne la rilatojn spacajn sed la rilatojn, de forta streĉo, montriĝos unufoje, ke ekzemple la *fortego* estas la pli granda forto, sed la *ventego* ne estos nur la pli granda vento : ĝi estos la vento kun fulmoj, tondroj, pluvoj (tempête, Gewitter). Kaj se mi volos nur diri pri pli granda vento, mi ne povos uzi « eg », sed mi devas diri : « granda vento ».


Jen montriĝos, ke grandigo aŭ malgrandigo per « eg » aŭ « et » povas havi du rezultatojn : en iaj fojoj radika ideo per egeco (aŭ eteco) ŝanĝas sin nur en skalo, en iaj aliaj okazoj ĝi kreskas (aŭ malkreskas) ĝis preskaŭ nova ideo, almenaŭ ĝis tiu ideo, kiu en lingvoj naturaj esprimas sin ofte per tute nova vorto radika.

En la dua okazo la malnova ideo, se ĝi devas esti nur,



grandigita aŭ malgrandigita, esprimas sin per la aldono de simpla adverbo : « granda » aŭ « malgranda ».

Ni povas ĝin prezenti tiel en figuraĵo



Tiu figuraĵo montras, ke en dua okazo la grandigo en direkto *ab* ĝis punkto *b* donas nur simple grandigitan ideon radikan kaj la plia grandigo, post tiu limo, alvenigas ĝis nova ideo t. e. ke ŝonĝiĝas ĉe kvanto ankaŭ eco.

## II

Nun mi povas demandi, ĉu efektive « ŝtonego » rilate al « ŝtono » estas pli grandigo « en kvanto » ol grandigo de domego rilate al domo ? Ĉu la punktoj *b* kaj *B* en pensata kvanto efektive respondas unu al dua, kiel ĝi ŝajnas sur figuraĵo ? Kielaj estas la limoj de grandigo en « eg », aŭ de malgrandigo en « et » ? Ĉu « eg » tre grandigas kaj « et » tre malgrandigas en tiuj okazoj, kiuj ne alvenigas nin al nova ideo ? Ĉu ili eble ŝanĝas la spacon ne malmulte, aŭ ŝanĝas kontraŭe en ĉiuj okazoj tre multe, preskaŭ senfine. Ĉu ne estas demando malplena. Nur de nia sento en tiu ĉi afero dependas, ĉu ni ne uzos en multaj fojoj « eg » aŭ « et », ĉu ni ĝin uzos, aŭ trouzos, aŭ fine uzos duoblajn « eg » aŭ « et » (egego kaj eteto).

Mi pensas, ke difini la lokan ideon de « domego » kiel nur korespondantan al « granda ŝtono » kaj ne kreskantan post la punkto *B* laŭ nia volo — estas erare ! Mi pensas, ke la limo de « eg » aŭ « et » ne povas esti precize difinita, ke ĝi dependas tute de subjektiva sento ! Mi pensas, ke vorto kun « eg » aŭ « et » povas esti lokita aŭ tre proksime al punkto de vorto radika, aŭ tre malproksime laŭ subjektiva sento kaj persona volo. Ĉar tie ĉi ĉio dependas de tio, kiel (en kvanto) mi prezentas al mi ideon de vorto radika kaj ĉu min frapas la grandigo de grandigo aŭ malgrandigo en rilato al grandigo de ideo radika.

Kaj tiu neprecizeco ne devas nin timigi. Se unu el ni diras « bela » pri tio, kio ŝajnas al dua « ne tre bela », aŭ tute « malbela », estas do ankaŭ komprenebla, se unu diros « belega » tie, kie dua diros nur « bela », aŭ « beleta ». Pri trouzado de tiuj ĉi sufiksoj ne eble estas paroli de punkto de elvido pure gramatike-logika; mi povas pri ĝi paroli nur de punkto psike-logika, kiel pri iom nenormala bezono de grandigado aŭ malgrandigado k. t. p.

Je punkto de elvido de regula lingva uzado tiu, kiu havas klaran volon ion grandigi, faras tute bone, se uzas « eg ». Kaj li povas uzi eĉ duope eg t. e. egegigi, se li havas klaran volon esprimi tre grandan grandigon!

Jen mi povas de tie diri: « eg » kaj « et » signifas grandigon aŭ malgrandigon ne difinan, devas esti uzataj, se al parolanto ĉeestas la volo de grandigo aŭ malgrandigo...

Kompreneble konstantiĝos meza mezuro, normala... « Trouzado » de « eg » kaj « et » estos ĉiam escepta, propra al certaj karakteroj, al certaj skribistoj kaj pli parolos al ni pri ilia naturo psikologika ol pri ilia koneco de lingvo esperanta. Mi pensas, ke trouzata « eg » kaj « et » estos iafoje interesa signifo stila de streĉo interna de skribisto.

### III

Oni devas do esti atenta, ĉu « egeco » aŭ « eteco » donas al ni nur simplan nedifinan grandigon ol malgrandigon, ĉu kontraŭe alvenigas nin ĝis nova ideo.

Mi pensas, ke tio ĉi ne povas ĉiam facile decidita esti, ĉar simpla komparo de vorto « egita » kun analogia vorto de lingvo natura ne sufiĉas. Al mi ŝajnas, ke iafoje estas en lingvo natura *du* vortoj kun *diversaj radikoj* kaj tiuj ĉi du vortoj rilatas sin unu al dua tiel, kiel en esperanto la vorto radika al vorto egita (aŭ etita); sed estas tamen okazoj, kie la rilato de vorto radika al vorto egita (aŭ etita) estos tia same kvankam la lingvo natura ne havas *unu* specialan vorton por traduki la vorton egitan (aŭ etitan). Cetere la rilatoj estas diversaj en diversaj lingvoj vorto kun « eg » (aŭ « et ») povas havi analogian vorton en unu lingvo natura kaj ne havi ĝin en alia, aŭ eĉ povas ne havi analogion en ĉiuj, naturaj lingvoj. Tiela vorto esperanta en traduko bezonos priskribadon per du aŭ tri vortoj naturaj.

Ni prenu kelkajn ekzemplojn.

- 1) Pluvegi — pluvi — pluveti.
- 2) Ridegi — ridi — rideti.
- 3) Petegi — peti — peteti.
- 4) Ploregi — plori — ploreti.

En tria kaj kvara ekzemplo, rilato de vortoj per « eg » al vortoj radikaj esprimas sin en lingvoj naturaj per rilato de diversradikaj vortoj; ekzemple france :

Peti = prier; petegi = supplier.

Plori = pleurer; ploregi = sangloter.

Kvankam *petego* ŝajnas esti nur grandigita peto, kaj *plorego* nur grandigita ploro, sed en tiuj ĉi faritaj per « eg » vortoj ni elsentas kvazaŭ novajn ideojn. Tiela noveco rimarkas sin en diverseco de radikoj de korespondantoj vortoj naturaj (*supplier* kaj *prier*; *sangloter* kaj *pleurer*).

En dua ekzemplo rilato de vorto per « et » al vorto radika kvankam ne esprimas sin per diverseco de radikoj (*rire* *sourire*; germane : lachen-lächeln), sed estas precize signifita per ekzistado de du vortoj. En « rideti » ni sentas kvazaŭ novan ideon; malgrandigita rido (rideto) estas por ni certa modo de rido; en diverseco de kvanto estas komprenata diverseco de eco.

Simile « pluveto » por nia penso estas difinata malgrandeca pluvo, signifita en kelkaj lingvoj per certaj vortoj.

Kontraŭe, de unu flanko « pluvegi » kaj « ridegi », de dua flanko « peteti » kaj « rideti » ne havas specialajn vortojn en lingvoj naturaj.

Tamen mi pensas, ke tiuj ĉi vortoj malgraŭ tio estas bonaj, plensencaj. Tiuj ĉi vortoj faras la riĉecon de Lingvo Esperanta; en ili esprimas sin la spirito de lingvo artefarita, io nova, kio povas elveki envion de spirito de lingvoj naturaj. Tiuj ĉi vortoj enhance, en mallongigo, esprimas ideojn, kiuj en lingvoj naturaj bezonas priskribadon per kelkaj vortoj.

Jes! ni povas do elsentati signifon de tiuj ĉi vortoj. Ni povas per analogio kompreni, ke la diverseco idea de vortoj « pluvegi » aŭ « ridegi » kontraŭ « pluvi » aŭ « ridi » estas simila al diverseco idea de vortoj « petegi » aŭ « ploregi » kontraŭ « peti » aŭ « plori ». Ni povas teorie elsentati kaj kompreni, ke malgrandigo de « ridi » ĝis « rideti » devas havi korespondantan grandigon de « ridi » ĝis « ridegi », aŭ ke

grandigo de « peti » ĝis « petegi » devas havi korespondantan malgrandigon de « peti » ĝis « peteti ».

Kaj mi kredas, ke kun tempo, ĉe buŝa kaj literatura uzado de tiuj ĉi vortaj konstruaĵoj per egigo kaj etigo, ili plenigos sin sence, ricevos, krom kvanta grandigo aŭ malgrandigo en spaco aŭ en forto, ankaŭ pentran, preskaŭ precizon, novan econ kontraŭ vortoj radikaj, senegaj kaj senetaj.

En « ridegi » ni elsentos kvazaŭ ridon larĝan, pergorĝan, fortesonan, tro laŭtan, malaristokratan, aŭ ion similan. En « pluvegi » esprimiĝos pluvo dikgrajnera, forte batanta teron. En « peteti » ni elsentas la peton ne persistan de iu, kiu hontas peti, kiu ne havas kutimon de petado, kiu fiere volas, ke oni tuj kontentigos peton kaj ĉesos antaŭe, ol longe peti. Simile en « ploreti » ni trovos la ploron mallaŭtan, interrompan, trankviliĝantan... (Rusa lingvo havas por ĝi la vorton : bnykat').

Mi ne kuraĝas persisti, ke mia klarigo de interna senco de tiuj vortoj, ne havantaj en lingvoj naturaj (aŭ havantaj nur en unu, du) sinonimajn vortojn, estas trafa, tute bona. Sed mi pensas, ke en uzado kun tempo la spirito de Esperanto trovos bonan vojon kaj difinos idean sencon de tiuj ĉi vortoj. Ĝi estos la granda triumfo de lingvo arteferita !...

#### IV

Mi divas ektuŝi ankoraŭ unu ideon, alligitan kun « eg » kaj « et ».

Mi diris jam, ke tiujĉi sufiksoj grandigas aŭ malgrandigas la skalon de spaco aŭ forto kaj ke krom tio ili aldonas aŭ ian novan econ al vorto radika.

Tiela nova eco povas esti, tre diversa. Sed oni devas priparoli kelkajn specojn de tiu nova eco.

En grandigo (per « eg ») oni povas elsenti ion, kio frapas, kio estas serioza, iafoje eĉ teruriga.

Sed de duaflanko tia grandigo povas doni en rezultato ion karikaturan, mallertan, komikan, mokindan.

Kaj en malgrandigo (per « et ») oni povas elsenti ion karesan, agrable malgrandan, elvokantan amemecon, bonajn sentojn.

Sed de duaflanko tia malgrandigo povas doni en rezultato ion karikature malgrandan, malsupran, komikan, mokindan.

Se mi estas prava, se egigo aŭ etigo ne sekvigas nur ŝanĝojn de skalo, sed ankaŭ ideajn kaj sentajn ŝanĝojn, oni devas konfesi, ke ni povas sin iafoje perdiĝi : sur kian flankon sin turni ĉe montrita diverseco ?

Ĉu « virinego » estas nur granda virino, neordinare granda, sed ankaŭ ne karikatura, bela, bone konstruita ĉe ŝia grandeco ? Aŭ eble ŝi estas objekto de moko, io tre mallerta, ne agrable granda, virino-dragono ?

Se mi diras : « infaneto », mi sentas, ke mi ion karese elparolas. Sed se mi diras « instruisteto », mi sentas, ke mi iun mokas. Kaj se mi diros : « majstreto », ĉu mi karesas aŭ ĉu mi mokas ?

Mi ne scias.

Mi pensas, ke nur en tono de buŝa elparolado aŭ en plena frazo la diverseco povas difiniĝi. Al mi ŝajnas, ke tiu ne difineco de vortoj aparte starantaj per « eg » aŭ « et » ne malutilas al precizeco de nia kara lingvo.

Sed eble aliaj ellumigos tiun ĉi malfacilan demandon alie, pli trafe ol mi... Mi atendas, ke la esperantistaro respondos mian demandon !

Leo BELMONT.

---

## DIVERSAJ JOJ

---

### Mona demando !

En diversaj vortaroj esperantaj, oni legas : *real* (monero) *realo* ; *reis* (monero) *rejso*.

Ĉu, en la portugala lingvo, *reis* ne estus la multenombro de *real* (portugala monero) ?

Se *reis* estas la multenombro de *real*, *rejso* estas tute neutila se oni havas jam *realo*, ĉar en tia okazo *reis* = *realoj*. Se oni preferas la radikon *reis* (pro la simileco de la adjektivo *reala*, kiu havas alian sencon), oni havas *real* = *rejso*, kaj *reis* = *rejsoj*.

K. V.

---

## Tutmonda labora Societo

---

Ni ricevis la jenan cirkuleron :

Mi havas la plezuron sciigi vin pri la fondo en Parizo de

« Tutmonda Labora Societo », (Amika Unuiĝo de l'Esperantistaj geoficistoj kaj gelaboristoj.

Tiu societo esta tute internacia.

Ĝia celo estas :

1° Divastigadi Esperanton inter ĉiuj gedungitoj.

2° Unuigi la Esperantistajn Gesalajrulojn por plifaciligi la rilatojn inter geoficistoj kaj gelaboristoj el simila ofico aŭ okupado, kaj per tio havigi senpage al ili ĉiujn sciigojn utilajn aŭ necesajn rilatantajn iliajn profesiojn.

3° Havigi oficojn aŭ laboron al la senlaboraj anoj, ĉu en komerco aŭ industrio, ĉu en administracioj.

4° Ricevi de Komercaj firmoj rabatojn specialajn por la Societanoj.

Ĉefaj kondiĉoj por fariĝi ano de l'Asocio :

1° Esti laboristo au. oficisto, almenaŭ 16 jara.

2° Pagi enskriban pagon po unu franko (unufoje pagita).

3° Pagi monatan kotizaĵon po fr : 0,50 t. e. frs 6.00 po jaro.

Ĉiu ajn persono aŭ Societo povas aliĝi al la Societo kiel honora membro pagante fr 20 jare, aŭ fr 250 unufoje pagite.

Tiuokaze, tiuj aliĝintoj estos nomitaj ĉiamaj honoraj membroj.

Ankaŭ ĉiuj donacoj, eĉ la plej malgrandaj estos ĉiam dankeme akceptitaj.

La Societo havos ĉiumonatan revueton senpage ricevotan de ĉiu partoprenanta aŭ honora ano.

La komitato konsistas el :

Prezidanto : S<sup>o</sup> F. STOECKEL.

Vic-Prezidanto : S<sup>o</sup> H. VAN DYCK (Holando).

Sekretario : S<sup>o</sup> P. Blaise (Belgo).

Sub-Sekretariino S<sup>ino</sup> CERF.

Kasisto : S<sup>o</sup> H. DENIS.

Bibliotekisto : S<sup>o</sup> L. CARLOS (Piemontano).

Membroj : Finoj B. HUCHON kaj A. SIZLER; S<sup>oj</sup> G. BLAISE (Belgo) : A. MAILHET; MOURY; kaj E. STOECKEL.

Por ĉiuj aliaj sciigoj sin turni al la Sekretario, 4 rue Bourg Tibourg. Paris IV<sup>e</sup>.

Esperante, Estimata Sinjoro, ke vi bonvolos sciigi viajn legantojn pri nia Societo, je la nomo de l'komitato, mi vin antaŭe dankas.

Kun kora saluto,  
Sindone via.

P. Blaise.

N. B. La societo estas tute sendependa; ĝi ne povas aliĝi al S. f. p. E. aŭ alia Esperanta grupo.

## « PROGRESO »

« La Progreso » Internacia Komercista Esperanta Societo, sidejo Frankfurt a. M., neue Mainzerstr. 59, progresadas : ĉe ĝia fondo de kelkaj semajnoj ĝi havis ĉirkaŭ 100 membrojn, nun ĉirkaŭ 200, inter ili 8 firmojn. Ĝi sukcesis, gajni por ĝiaj celadoj la « Kaufmännischer Verein » kiu havas 17,000 membrojn kaj kiu publikigis en ĝia organo « Kaufmännische Zeitung » laŭvorte la tutan paroladon, kiun Sr<sup>o</sup> Feyerabend faris ĉe la fondo de la societo. Plue, ĝi donis al la juna societo senpage instruejon por esperanta instruo. Ankaŭ urban lernejon la societo obtenis, por lernigi en tio Esperanton. Devas esti speciale akcentata, ke la « Progreso » tute ne volas konkuri je la Esperantistaj Grupoj — tri estraranoj de la Esperantista Grupo Frankfurt a. M. inter ili la prezidanto Sr<sup>o</sup> KÜCHLER mem, estas ankaŭ en la estraro de la « Progreso ». En urboj en kiuj jam ekzistas Esperantistaj Grupoj, la « Progreso » rekomendas al siaj membroj uzi la lernkursojn de tiuj, ĉar ĝia ĉefega celado, estas provizore *la propagando de Esperanto nur inter la komercistaro* kaj en tiu maniero, ĝi multe povas helpi la agadon de la Esperantistaj Grupoj, kiuj hodiaŭ havas la malfacilan taskon de la propagando de Esperanto inter la plej diversaj homaj klasoj kaj profesioj. Kiu estas la homo, kiuj la plej ofte devas interkomunikiĝi kun la reprezentantoj de la plej diversaj nacioj? la komercisto! Li do unue ekkonos la gravegecon de nia ideo kaj post la praktika konsidero de la moderna komercisto tre rapide malaperos la antaŭjuĝoj, kiujn ofte, tre ofte ankoraŭ renkontas la ĝenerala propagando de nia afero inter la diversegaj profesioj.

Antaŭen do, la celo estas klara antaŭ niaj okuloj, ni streĉu ĉiujn fortojn por ĝin atingi! » (*Komunikita*).

## REZULTATO DE L'KONKURSO

### POR AFIŜOJ DE L'KONGRESO

- 1<sup>a</sup> « Unuiĝo per Kompreniĝo ». — S. de CONINCK, Marseille. *Premio da 50 fr.*
- 2<sup>a</sup> « Verdo de l'Espero ». — S. Firmin BAEYENS, Anvers.
- 3<sup>a</sup> « La Suprématie ». — Tom YUILE, Glasgow.
- 4<sup>a</sup> « La Prezidanto ». — S. J. A. WOODHEAD, Leeds.
- 5<sup>a</sup> « Verda Stelo ». — S. FINEZ Grégoire, Paris.

- 6<sup>a</sup> « Signo ». — Alfred J. HULME, Shrewsbury.  
 7<sup>a</sup> « L'Ami Karo ». — S. J. CHAPUIS, Lyon.  
 8<sup>a</sup> « Esperanto ». — S. W. W. HIDE, London.  
 9<sup>a</sup> « En la Mondon venis nova Sento ». — S. Louis  
 BERNARD, Paris.  
 10<sup>a</sup> « Naŭ koroj ». — P. WILHARDT, Kjöbenhavn.  
 11<sup>a</sup> « Voli estas Povi » — J. T. STYNEN, Anvers.  
 12<sup>a</sup> « La Venkonto ». — S. MORINEAU, Québec, k. t. p.

Kelkaj Samideanoj sendis al ni ŝatindajn projektojn, sed malfeliĉe ili subskribis ilin, malgraŭ la regularo de l'Konkurso, kaj ni ne povis ilin klasigi.

Al ĉiuj, la Komitato esprimas varman dankon

Unu sekretario,

Emile BERNARD.

## LASTE APERINTAJ VERKOJ

### Eldonoj de la Presa Societo.

**La Fundamentoj de l'Pacifismo**, de ELIE DUCOMMUN, honora sekretario de l'Internacia Oficejo de Paco; trad. de V. DUFÉUTREL 32-paĝa broŝuro eldonita de la Societo « Pacifisto ». Senpaga por la Societanoj. Por nesocietanoj, 0 fr. 50. — Luksa eldono : 1 fr.

**Du Noveloj**, de D. DE ROTHAU. Du originalaj rekontoj en Esperanto, titolitaj « La Blanka Kastelo » kaj « Esperantista Hotelo ». 60-paĝa broŝuro : 1 franko.

**Rememoro pri Solferino**, de H. DUNANT, iniciatinto de la Ruĝa Kruco. Tradukita kun permeso de l'aŭtoro, de A. VAILLANT kaj P. FRUCTIER. Biografio de Dunant, verkita de G. KOLOWRAT kaj portreto de l'aŭtoro. 1 broŝuro 80 paĝa, 1 fr. Luksa eldono : 2 fr. Eldonita de la Societo « Pacifisto ». 40 % — a rabato al Societanoj.

**Propaganda Poŝtkarto** en franca lingvo, entenanta la tutan gramatikon kaj mekanismon de Esperanto. Vendata por la profito de la grupo Esperantista en Versailles kaj eldonita de ĝia prezidanto Dr<sup>o</sup> Diéterlen, 1 karto, 10 centimojn.

**En Songo**, tri ilustritaj poŝtkartoj kun la teksto de la versaĵo de Dr<sup>o</sup> Zamenhof. La serio da 3 karto, 15 centimojn.

### Diversaj eldonoj.

**Parolado pri la Metodo**, de DESCARTES, tradukita de Dr<sup>o</sup> Noel kaj Pr<sup>o</sup> THIAUCOURT. Litografita eldono.

**Tutmonda Jarlibro** por 1906 : 3.50.

**Don Juan**, de MOLIERE, tradukita de E. BOIRAC, 108-paĝa broŝuro, 1 fr 50.

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Laocépède, Paris

Administrantaro Th. Cart, prezidanto; Paul Fructier, Ch. Vérax, deleg.;  
 Pr<sup>o</sup> Benoit, Dr<sup>o</sup> Vallienne, membroj.

Sekretario de l'adm. V. Chaussegros. Teknika direktoro Lengyel Pál.

L'Imprimeur-gérant : P. Fructier.



PAUL DE LENGYEL sciigas siajn amikojn kaj korespondantojn, ke li ŝanĝis sian loĝejon, kiu nun estas: 15, Rue Gracieuse, — Paris (5°).

---

A. S. FEDORĈENKO, studento, *Ruslando*, Kieff, deziras interŝanĝi salutojn kun geesperantistoj ĉiulandaj per ilustritaj estetikaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de urboj, kaj portretoj de societaj eminentuloj kaj geartistoj gloraj. — Responde li sendos artan poŝtkarton.

---

HELSINGFORS, Finlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr. : It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

---

STENOGRAFIO. — S-ro Maurice David, sekretario de la grupo Esperantista en Saint-Claude, deziras trovi monhelpanton por eldonigi lernolibron de Esperanta Stenografio verkita laŭ la metodo Prévost-Delaunay. — Oni volu turni sin al S-ro David, 36, faubourg Marcel, Saint-Claude, (Jura), Francujo.

---

*Le Creusot* (Francujo). F-ino JANE DEBROSSE, deziras korespondadi poŝtkarte kun ĉiulanduloj. Ĉiam kaj tuj respondos.

---

LA INTERNACIA TRINKAĴO !

---

**Viskio Esperanto**

Registered trade mark

N° 270,042

Marque déposée

N° 13,195

Registered label N° 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **Esperanto** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

**BUCHANAN, SCOTT & Co**

*Garthland street,*

**GLASGOW (Skotlando).**

☆☆

---

# LA REVUO

Internacia monata literatura gazeto  
kun la konstanta kunlaborado

de D-ro L. L. Zamenhof.

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura; ĝi enhavos novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studojn pri historio, geografio, statistiko, popolmoroj, k.c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografion.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povas naski disputojn, estos malakceptata de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof sola povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1-a numero aperos la 1-an de septembro 1906, okaze de la II-a Universala Kongreso de Esperanto.

Kosto : ĉiu numero 0 fr. 50  
jara abono 6 fr.

ONI POVAS ĜAM DE NUN ABONI

ĉe la Librejo **HACHETTE kaj K-o,**  
79, Boulevard Saint-Germain, **Paris.**

---

**ADELBODEN, Berna Oberlando, 1350 m. s. m.**

LEGU PRISKRIBON EN « TRA LA MONDO »  
DE TH. HOPF, INTERNACIA APOTEKISTO.

**ESPERANTA PENSIO HAGEN. ADELBODEN.**



*De la sama aŭtoro aperos baldaŭ*

**« TRA OBERLAND BERNA »**

multe ilustrita gvidlibro en Esperanto

**PRÉCIPÉ VERKITA POR KONGRESANOJ**

Aĉetebla ĉe

**OSCAR HOPF en THUN**

Svisa Esperanta Eldonejo.

Oni akceptas anoncojn kaj donas ĉiujn informojn.

Eldono de fremdula nomaro ilustrita.